

PREZO: 1.- Kr.

Internacia
Lingva Revuo

9478

MALGRANDA REVUO

Nro 2 · 1949

7a JARO

ENHAVO:

	Paĝo
La plej granda problemo, de Anders Ūrne	1
Vortoj kaj realo, de Stellan Engholm	9
Proletara lingvo, de L. C. Dej	13
Ĉu kondamni teknikon? de Günther Bammert	14
La homa korpo sub premo, de Mason Stutard	16
El Nederlanda folkloro, de J. M. Toorneman	20
Lingvaj sugestoj	25
Literaturo	31

Redaktoro — Eldonanto:

STELLAN ENGHOLM, LUDVIKA, SVEDUJO

MALGRANDA REVUO

aperas kvaronjare. Prezo 1 kr. (inkl. sendkoston). Jarabono 4 kr. Unuopa ekz. al eksterlando kontraŭ 3 rpk. — S. Engholm, Skolgatan 9, Ludvika, Svedujo. Poŝta ĝirokonto 26 80 23.

MR ne aperigas anoncojn aŭ informojn.

Perantoj

Aŭstrio: Eldonejo "Tramondo", Neutorgasse 9, Wien I.

Belgujo: Flandra Esperanto-Instituto, P. van Humbeckstr. 3, Brusel W.

Brazilo: Sro Jozefo Joels, Caixa Postal 2 — Lapa, Rio de Janeiro.

Britujo: Libroservo de UEA, Heronsgate, Rickmansworth (Herts).

Ĉeĥoslovakio: Esperanto-Asocio en ĈSR, Uralské Nám. 9, Praha.

Danujo: Libroservo de CDEL, Pr. Jørgensgade 4 A, Kopenhago N.

Finnlando: Eldono Vilho Setälä, Onnentie 23, Helsinki Kä.

Francujo: Unuĝo Esperantista de Francujo, 34 rue de Chabrol, Paris X.

Germanujo: Ing. Hellmut Otto, Bamhlstr. 7, Berlin-Spandau.

„ Sro Oscar Bünnemann, Isenstr. 79 III, (24) Hamburg 13.

Italujo: Sro Leo Costantini, Piazza Lagosta 2, Milano.

Nederlando: Libroservo FLE, Roelantstr. 4, Amsterdam W.

Palestino: Sro J. Kohen-Cedek, P. O. B. 7015, Jerusalem.

Polujo: R. Sakowicz, Parafialna 3, Nova Sól.

Svisujo: Sro O. Walder, Elgenheim, Romanshorn.

Usono: Libroservo de American Esperantist, 114 W. 16 St. New York 11.

MALGRANDA REVUO

Nro 2

7a JARO

1949

La plej granda problemo

De ANDERS ÖRNE

Rim. — Anders Örne estas ĉefdirektoro de la sveda poŝto. Krome li estas konata kiel unu el la plej elstaraj personoj en la sveda kooperativa movado.

La plej granda problemo de la homaro — ĉu ne estas nepriensite uzi tiun vortkunmeton en tempo, kiam laŭ nia tuta horizonto la problemoj amasiĝas kvazaŭ nigraj fulmotondraj nuboj, ĉiutage minacantaj per eksplodo kaj katastrofoj? Ĉu ne ĉiuj tiuj problemoj estas tiom grandaj, ke estas malfacile decidi, kiu estas la plej granda?

Miaparte mi ne hezitas pri la respondo. Kiam oni analizas la multajn diversajn demandojn, kiuj postulas solvon dum la proksimaj jardekoj, oni devas halti antaŭ unu, kies signifon komprenas nur eta malplimulto de la terloĝantoj, sed kiu facile estas pruvebla pli grava kaj pli malfacile solvebla ol ĉiuj aliaj kune: *la demando de la homnombro.*

La tero havas nun 2.300 aŭ eble 2.400 milionojn da homoj. La nombro kreskas rapide. Jam post 50 jaroj la cifero povos esti ĉirkaŭ 4.000 milionoj, se la detruado de la grandaj malsanoj estos iom malhelpata kaj tioma kreskigo de la nutraĵprovizo okazos, ke la novaj homoj ne rekte mortos pro malsato. Oni nun laboras — kiom estas eble en mondo, kie mankas paco kaj leĝa sekureco — por realigi la punkton en la Atlanta programo pri ĉies liberigo de manko. Jam kun la nuna homnombro tio estas giganta tasko. La ekspertoj samopinias pri tio, ke minimume du trionoj — kelkaj diras tri kvaronoj — de ĉiuj homoj, t. e. ĉirkaŭ 1.600 milionoj, vivas sub la nutraĵ-

minimumo. Ili devas kontentiĝi per nesufiĉa aŭ malaltvalora nutraĵo. Mankas al ili konvenaj loĝejoj, sendifektaj kaj puraj vestoj, mankas vojoj, lernejoj, libroj, gazetoj, malsanulflego — mallonge, la plimulto de tio, kion ni en ekz. Svedujo, Svisujo kaj Usono konsideras apartenanta al la simplaj necesajoj.

Nu, unualoke temas pri pliflikigo kaj pliampleksigo de la terkulturo, oni diras. La nutraĵo estas la elementa afero. Se la malsatantaj 1.600 milionoj nur povos satmanĝi, estos eble al ili per propra laboro akiri ĉion alian. Bezonataj estas disvasligo de scioj, scienca plantplibonigo, lukto kontraŭ plantaj kaj dombestaj malsanoj, alligo de la provizo de kemia sterko, novkulturado de areoj nun neuzataj, plibonigitaj komunikoj en kaj inter la landoj. Ĉio tio estas atingebla en kelkaj jardekoj per fortostreĉo de la popoloj en pli bona situacio, oni diras. Sendube. Kun la sama energimobilizo, kiun postulis la lasta mondmilito, oni povus tre multe atingi. La malfeliĉo estas, ke la mondo ĝuste nun estas tiom disŝirita, ke komuna ago tiom granda estas simple nepensebla — krom por tria mondmilito, kiu estos rezulto de la streĉo inter Oriento kaj Okcidento, se tiu daŭre plifortiĝos. La popoloj, kiuj materie plej malbone status, krome ne volas akcepti helpon por leviĝi, se al la helpo estas ligita kontrolo pri ĝia uzo. Daŭra liberiĝo de mizero efektive estas atingebla nur per memhelpo de ĉiu popolo, apogita de financa helpo de ekstere. La premiso por tia helpo estas kreo de ordo kaj leĝa sekureco en la landoj helpotaj. Sen tiu premiso ĉiuj oferoj de ekstere neniam utilas. Daŭre oni ne povos vivteni la helpemon en la pli bonsituaj popoloj, se antaŭpagaj liveroj de varoj kaj produktadrimedoj neniam estos pageblaj, aŭ se oni riskas unuflankan ŝuldnuligon de la riecivito, kvankam li kapablas pagi la ŝuldojn. La spertoj de la tri lastaj jardekoj ĉiuokaze kreis nefidemon, kiun nur longa tempo povos forigi.

Se ni tamen supozas, ke ĉiuj malfacilaĵoj estas venkeblaj kaj ke la nutraĵproduktado ĉiujare altiĝos per tiom aŭ tiom da milionoj da tunoj, estiĝos tamen la paradoksa situacio, ke la nombro de konsumantoj en la suferantaj landoj kreskos ankoraŭ pli rapide ol nun, kaj tiel ĉio restos kiel antaŭe — manko kaj mizero al la granda amaso de la loĝantaro.

Malgraŭ la milito kaj la malpli bonaj eblecoj por vivteno la

loĝantaro daŭre rapide kreskis en Japanujo, jam antaŭe troloĝata lando. Oni ne scias certe, kiel status la plimultiĝo en Ĉinujo, kiu malgraŭ ĉiuj perdoj nun kredeble havas almenaŭ kvinonon de la tuta terloĝantaro. Jam ĉirkaŭ 1935 oni prikalkulis, ke la nombro estas 450 milionoj. Kredeble ĝi ne restis senŝanĝa dum la postaj jaroj. Certe estas, ke paco kaj pli bona nutrajprovizo okazigus preskaŭ eksplodan kreskon de la loĝantaro en tiu grandega lando.

La loĝantaro en Hindujo plimultiĝis inter la du lastaj popolnombradoj per 1,01 % jare kaj atingis 1941 405 milionojn kontraŭ 120, kiam la lando venis sub britan regadon. Kun la sama jara kresko dum la proksimaj cent jaroj post 1941, la loĝantaro atingus, se mi ĝuste kalkulis, la sekvantajn ciferojn:

Jaro 1966	522 milionoj
„ 1991	668 „
„ 2016	859 „
„ 2041	1.105 „

Tio signifas, ke la homnombro de Hindujo iom post 2050 estus atinginta proksimume la duonon de la tuta homaro de nia tempo. Ĉar la 405 milionoj 1941 signifis 85 loĝantojn sur ĉiu km² — Svedujo havis 14 — Hindujo havus 2041 ĉirkaŭ 232 loĝantojn sur ĉiu km².

En grandaj partoj de Japanujo la plimultiĝo de la homoj estis 2 % jare. Laŭ Statistika jarlibro (la sveda) de 1946 la suma homnombro de la lando estis 105 milionoj aŭ 154 sur ĉiu km². Nun grandaj partoj estas for de tiu regno, kiun ampleksis la lasta popolnombrado, sed memkompreneble tiuj teritorioj kun ĝiaj loĝantoj restas en aliaj politikaj interrilatoj. Se la nombrokresko en tiu teritorio daŭre restus 2 % jare, la homnombro jam post 25 jaroj atingus 172 milionojn, post 50 jaroj 282 milionojn, post 75 jaroj 461 milionojn, post 100 jaroj 760 milionojn. La nunaj 154 loĝantoj sur ĉiu km² je tiu tempo estus kreskintaj ĝis 1.116 sur ĉiu km².

Se ni taksas la tutan nunan homaron je 2.400 milionoj kaj la nombrokreskon je la sama cifero kiel tiu de Hindujo, t. e. 1,01 (unu kaj unu centona) procento jare, ĝi post 50 jaroj

estus atinginta 3.960 milionojn kaj post 100 jaroj 6.500 milionojn.

Ĉe tiom ekstreme malforta nombrokresko kiom la sveda dum la lasta nombradperiodo, t. e. 0,38 %, dum cent jaroj kreskigus la loĝantaron per 46 %, kio signifas, ke la loĝantonombro de la lando en la jaro 2050 proksimiĝus al 11 milionoj (je la komenco de 1948 6.842.000). La kresko dum la lasta jardeko tamen estis konsiderinde pli alta, kaŭze de altiĝinta naskiĝonombro kaj ne sensignifa enmigro de homoj en laborkapabla aĝo.

Troviĝas nun tri rezervoĵ disponeblaj:

1. Plibonigo de plantoj kaj dombestoj kunlige kun lukto kontraŭ malsanoj ĉe tiuj du grupoj de nutraĵproduktantoj.

2. Novkulturado de ankoraŭ neuzataj areoj, precipe en Ameriko kaj Afriko.

3. Kemia produktado de nutraĵoj por homoj kaj bestoj.

Kompreneble oni devas uzi tiujn tri rezervoĵn. Sed kiom ili sufiĉas?

La plibonigo de plantoj kaj bestoj post ĝia baziĝo sur scienca fundamento havis mirindan progreson, kiu alportis tre bonfarajn rezultojn. Ankaŭ la lukto kontraŭ plantaj kaj bestaj malsanoj, precipe dum la lasta jardeko, faris gigantan paŝon antaŭen. Sed ĉe se oni aldonas la kreskon de la kemiaj sterkaj kaj la plibonigon en la flego de agroj kaj herbejoj kaj supozas pli intensan biologian perfektiglaboron, oni tamen kredeble rajtas aserti, ke kunefikado de ĉiuj tiuj produktadaltigaj faktoroj nur post 50 jaroj kapablos doni bonan nutraĵnivelon al la *nuna* loĝantaro de la tero. Sed dum tiuj 50 jaroj la homnombro kreskos per almenaŭ 1.500 milionoj, se oni ne faros specialajn aranĝojn por haltigi la plimultiĝon, kie ĝi nun estas tre granda. 1.500 milionoj da homoj konsumas proksimume 220 oble pli da nutraĵoj ol kiom nun konsumas la tuta sveda loĝantaro, kalkulite laŭ la sama konsumo por ĉiu individuo kiel la sveda. Tio donas imagon pri la giganteco de la problemo.

Koncerne la novkulturadon estas vere, ke grandegaj areoj restas por utiligo al la nutraĵproduktado. Tamen ekzistas unu *sed*. Ni estus devintaj lerni de malgaja sperto de jarmiloj, ke la kulturata tersurfaco suferas grandajn riskojn. Grandaj areoj, kiuj en la antikva tempo estis fruktodonaĵ kaj dense

loĝataj, pro influo de fluanta akvo kaj ventoj transformiĝis en preskaŭdezertojn. La fruktodona humo estas transportita en la maron aŭ forportita de la vento. Inter la du mondmilitoj grandaj partoj de Norda Ameriko suferis de tia detruo. Oni senpripense plugis grandajn areojn de la malnova herbostepo, de kiu tiel estis rabata la natura protekto de fortikaj herbordikoj, kaj ĝi fariĝis viktimo de fluanta akvo kaj ventegoj. Se oni senkonsidere forhakas la praarbaron en Brazilo kaj certaj partoj de Afriko, oni povas timi tre malutilajn efikojn de la tieaj fortegaj pluvoj. Pro tiu kaŭzo nur limigita parto de tiuj grandegaj teritorioj estas konsiderebla kiel kulturgrundo. En tiuj regionoj de Afriko, kiujn oni antaŭ nur kelkaj jardekoj konsideris tre konvenaj por kulturado, dum la lasta tempo montriĝis tre forta sekiĝo. Tamen troviĝas ankoraŭ en tiu mondparto fantazie grandaj areoj uzablaj por kulturado kaj brutbredado, post kiam oni trovis rimedojn por ekstermi la plagon de tiuj regionoj, la detruantaj insektojn, per DDTpreparaĵoj kaj aliaj rimedoj. Tiuj rimedoj tamen rapidigas ankaŭ la kreskon de la loĝantaro. Gazeta mencio antaŭ kelka tempo rakontis, ke iu negra tribo, kies nombro ne kreskis dum la lastaj cent jaroj, post uzado de DDT kreskis per 10 procentoj en unu jaro. Memkompreneble tia popolokresko ne povas daŭri multajn jarojn. Tiuj infanoj, kies vivon savis la insekteksterma rimedo, fariĝos generkapablaj nur post multaj jaroj. Sed en regiono riĉe naturdotita la kresko tamen povus meznombro por pli longa periodo konsiderinde superi 2 % jare, t. e. la nombro de la tribo povus dum jarcento proksimume dekobliĝi.

Oni povas supozi, ke la giganta Sahararegiono en malnova tempo, kiam la granda glacio ankoraŭ kovris grandajn partojn de Eŭropo, konsistis el herbokovritaj teroj, kie grandaj amasoj da sovaĝaj bestoj trovis sian nutraĵon. Per artefarita akvado el boritaj putoj oni nun provas transformi parton de la dezerto en kulturgrundon. La akvo venas de la montegoj en la ekvatoraj regionoj kaj fluas tra sabloŝtonaj tavoloj profunde sub la tersurfaco, sed la fluo moviĝas nur kelkajn decimetrojn jare. Tiu akvoprovizo ne povas estigi gigantajn kulturregionojn. Tute alie estus, se la eltrovoj pri utiligo de la atomenergio iam —eble post duona jarcento— povus doni efektive utilige-

blajn rezultojn. Per helpo de scilimaj kaj tre malkaraj energi-provizoj oni povus distili la marakvon kaj en grandaj riveroj dissendi ĝin en la dezertajn regionojn de Afriko, Azio kaj Ameriko, fruktigante regionojn, kiuj estas pli grandaj ol tuta Eŭropo. Sed ĉu tia evoluo estas atendebla? La atomenergiaj ekspertoj mem dubas pri tio.

Kaj fine la kemia produktado de nutraĵoj el neorganikaj substancoj. Ke la kemiistoj povas solvi la problemon, estas verŝajna afero, ĉe se iom da tempo pasos, ĝis la metodoj fariĝos ekonomie uzindaj kaj pretaj por grandskala uzado. Nutraĵfabrikoj, kiuj rekte aŭ pere de dombestoj povas nutri centojn aŭ milojn da milionoj da homoj, memkompreneble prokrastus dum unu aŭ unu kaj duona jarcento la popolnombro katastrofon. Sed dum periodo tre mallonga el historia vidpunkto ĝi tamen atakus la homaron, se la plimultiĝo pludaŭrus same neregulite kaj laŭ la sama progresio kiel ĝis nun.

Kiel ni supre vidis, estas kaŭzo supoziti, ke la loĝantaro de la tero duobliĝas en cent jaroj. Kun pli granda provizo de nutraĵoj ĝi kreskus multe pli rapide. Ni tamen supozu, ke la kresko ne estas pli granda ol duobliĝo dum cent jaroj. Kion signifas tio? Por ne tuŝi naciismajn sentojn eble estas plej bone uzi konstruitan ekzemplon: jen troviĝas ie sur la tero iu regiono de 100.000 km² kun 30 loĝantoj sur ĉiu km² en la jaro 1900, do sume 3 milionoj da loĝantoj. En la jaro 2000 la loĝantaro estus duoble pli granda, do 6 milionoj, post ankoraŭ cent jaroj 12 milionoj kaj en la jaro 2200 24 milionoj, kio signifas 120 loĝantoj sur ĉiu km². Tiel pludaŭrus dum jarcento post jarcento. Dum 1.000 jaroj, t. e. ĝis la jaro 2900, ĝi obliĝus 1.024 fojojn aŭ ĝis $1.024 \times 3.000.000 = 3.072$ milionoj aŭ 30.072 loĝantoj sur ĉiu km², kio estas iom pli ol 300 sur ĉiu hektaro. Post ankoraŭ 1.000 jaroj, do 3900, la popolnombro estus altiĝinta ĝis 3.145.728.000.000 individuoj, kio estus pli ol 31 individuoj sur ĉiu m² (kvadratmetro).

Tiu konstruita ekzemplo montras, ke ĉe se oni povus racie solvi la nutrademandon per kemia metodo, oni tamen post certa tempo, tre mallonga en komparo kun la aĝo de la homaro, venos al tute neeltenebla situacio.

Laŭ Statistika jarlibro (la sveda) la suma areo de la kon-

linentoj — krom la 11.188.000 km² de la polusregionoj — estas 133.327.000 km². En tio estas enkalkulitaj montoj, dezertoj, tundroj kaj negrandaj akvoj. Meznombro la tera loĝantaro, tie ĉi taksita je 2.400 milionoj, estas iom pli ol 18 personoj sur ĉiu km². Post 1.000 jaroj ĝi estus ne malpli ol 18.000 sur ĉiu km². Por Svedujo, kiu nun havas 14 loĝantojn sur ĉiu km², la denseco de la loĝantoj sub la diritaj kondiĉoj estus post 1.000 jaroj 14.000 sur ĉiu km².

Tiuj prikalkuloj estas pure teoriaj, sed tiom ili tamen montras, ke la plimultiĝo de la homoj ne povos longe pludaŭri sen troloĝateco sur nia globo. Ke jam nun regas forta manko de nutraĵoj, dependas simple de tio, ke la homnombro en tre multaj landoj kreskis pli rapide ol la provizoj por kovri la bezonojn de la konsumantoj. Se oni komencus energie labori, laŭ supre dirita maniero, por ke la produktado atingu la amplekson de la konsumado, la rezultoj de tiu laboro en malpli ol unu jarcento estus nuligitaj de la popolkresko, kaj la cirkonstancoj estus pli malbonaj ol nun. Petrolo kaj aliaj krudvaroj mankus jam nun, se la konsumo de ĉiu individuo fariĝus ĉie same granda kiel nun en Usono. La rezulto por la homaro kiel tuto estas facile antaŭvidebla: *Novaj militoj, pli teruraj ol iu antaŭa*. La malbonfama imperiismo de Japanujo nekontraŭdireble havis kiel fonon la grandegan popolkreskon en tiu surfaĉo malgranda lando. La plano de la regantoj estis per helpo de militaj rimedoj konkeri kaj estri la pli grandan parton de Azio kaj eldevigi de la subpremitaj popoloj tributojn, kiuj sekurigu la nutradon kaj la nelimigitan plimultiĝon de la sinjorpopolo. La fortoj ne sufiĉis por realigi tiun groteskan penson. Se diktatoreca Ĉinujo kun plena socia ordonmastrumado kaj kulmine armita surirus la samajn vojojn, la cetera mondo estus perdita. Sovetunio, kiu klopodas por efektiviĝi la solpotencan sistemon en Ĉinujo, eble post duonjarcento, se la planoj sukcesus, devus malfermi sian azian teritorion al ĉina ekspansio. Post kelkaj jarcentoj tiu pecc estus digestita, kaj la konkerado paŝus plu.

La ideoj de la germanaj naciistoj, la italaj faŝistoj kaj de aliaj solpotencaj partioj montras ekstreman miopecon. Iliaj "ŝtatestoj" volis meti sub sian potencon pli kaj pli grandajn teritoriojn por povi nutri kreskantan loĝantaron, kaj interne de

siaj limoj ili per ĉiuj rimedoj de la propagando stimulis la homplimultigon. Ili ne pensis tiom antaŭen en la tempo, ke ili povis kompreni la vantecon de tiaj klopodoj. En tempodaŭro, kiu el historia vidpunkto estas nur momento, iliaj ficraj planoj estus nuligataj de la rapide altiĝanta popolondo.

Ke la supre preparolita homa tromultiĝo ne fariĝis fakto jam antaŭ jarmiloj, tion malhelpis malsato, malbona flego de infanoj, pesto, tuberkulozo, ekzantema tifo, malario, flava febro, dormomalsano, naturkatastrofoj kaj militoj. Plibonigita tekniko, ekzemple la transiro al terkulturado kaj metoda brutbredado, siatempe disvastigis la loĝoregionojn kaj kaŭzis konsiderindan plimultiĝon de la homoj. Sed ĉiam funkciis la samaj retenaj faktoroj. Ili tamen ne povis malhelpi, ke la homa plimultiĝo fariĝis pli kaj pli forta laŭ la grado en kiu la homoj lernis regi la fortojn de la naturo. La rezulto estas, ke dum la lasta jarcento la nombro de la homoj en la mondo pli ol duobliĝis kaj ke minimume du trionoj de ĉiuj homoj ne ricevas kontentigan nutraĵon kaj cetere vivas sub kondiĉoj tute ne homindaj.

Neniu okcidenta homo kun normala menso povas havi la koncepton, ke la ĝisnunaj bremsoj sur la homa plimultiĝo en la mondo daŭre estu permesataj funkcii en sia terura sed tamen finfine malmultefika maniero. Kiu rimedoj do troviĝas? La malnova ekonomiisto Malthus rekomendis limigon en la generado. Li apelaciis al la morala forto en la homoj, pri seksa abstinado. Malpli ol iam antaŭe la grandega plimulto de la homoj en niaj tagoj kredas al tia programo. Anstataŭe plioftiĝas libervola reguligo de la infannombro en la familioj. Doni vivon al infanoj, kiuj renkontos nur suferojn, estas ago ne racia kaj ankoraŭ malpli morala. Mortigi homojn laŭcele aŭ lasi ilin morti pro manko kaj mizero estas sub neniu kondiĉoj toleribla. Tial la sola rimedo kredeble estas disvastigi scion pri naskolimigaj manieroj al tiuj popoloj, kiuj ankoraŭ ne konas ilin, kaj doni al ili en tiuj aferoj alian koncepton anstataŭ ilia nuna.

El la supre dirita montriĝas, ke en iuj partoj de la mondo ankoraŭ estas loko por ioma multiĝo de la homoj, sed en aliaj, ekzemple Japanujo, Hindujo kaj Ĉinujo, la multnombreco jam transiris la aprobeblajn limojn. En Svedujo, kun la nuna nombrokresko, la danĝero de tromultiĝo ne minacas dum la prok-

simaĵ jardekoj. Sed longa tempo ne pasos, antaŭ ol la problemo aktualiĝos ankaŭ ĉe ni. Niaj arbarprovizoj ekz. estas tre forte uzitaj. Kun enlanda konsumado de arbarproduktoj — papero, ligno, hejtligno — duoble pli granda ol la nuna manko al ni varoj por interŝanĝi kontraŭ nutraĵoj kaj aliaj nepre necesaj varoj el aliaj landoj, kaj sekve de tio la vivtena nivelo nepre malaltiĝos.

Kiu faris la klopodon tralegi tiun ĉi artikolon, tiu eble emas ŝovi la tutan problemon flanken, dirante, ke ne koncernas nin nuntempulojn tio, kio okazos en malproksima estonto. Efektive la sekvoj de la okazanta granda plimultiĝo de la homoj fariĝos sentebraj post mirige mallonga tempo. Multaj junaĵoj, en la aĝo de ĉirkaŭ dudek, havas grandajn ŝancojn ĝisvivi la jaron, kiam la nombro de la homoj en la mondo atingos 4.000 milionojn.

Tradukis S. Engholm.

(La sveda originalo de la supra artikolo aperis en la kooperativa revuo Kooperatören nro 6 1949.)

Vortoj kaj realo De STELLAN ENGHOLM

La celo de Kravčenko en la fama proceso estis montri, ke lia libro estas vera kaj verkita de li mem. En la komenco de la proceso li diris aŭ sugestis — mi ne laŭvorte memoras la frazon — ke liaj kontraŭuloj aspektas, kvazaŭ ili estus venintaj el menaĝerio. La senco de tiu frazo do estis proksimume jena: "Tiu homoj pretendas, ke mia libro estas mensoga kaj verkita ne de mi. Rigardu, ili aspektas kiel simioj kaj aliaj bestoj! Sekve mia libro estas vera kaj verkita de mi."

Liaj kontraŭuloj siaflanke superŝutis lin per ne malpli da invektivoj, uzante la saman pruvmetodon. Proksimume tiel: "Li estas drinkemulo, dando, fierulo, trompulo. Sekve lia libro estas mensoga, verkita ne de li."

El tia traktadmaniero de donita temo oni povas konkludi nur tion, ke la disputantaj sinjoroj aŭ ne komprenis, kio estas laŭ-

fakta kaj logika pruvado, aŭ ke tio estas al ili flanka aŭ almenaŭ duaranga afero.

Tiaj vortoj kaj frazoj havas nenian efektivan rilaton al traktata faktaro, ili ne estas eĉ subjektivaj valorprijuĝoj sed tute simple insultvortoj. Ili estas esprimo ne de veramo kaj racia pensado sed de malŝato kaj malamo de unu al alia.

Tia diskutmetodo estas negativa rilate al la traktado de donita temo sed havas pozitivan cfikon en alia direkto. Vortoj kaj frazoj, kies efektiva celo estas esprimi fieron kaj memkontenton, malŝaton kaj malamon de unu persono aŭ grupo al alia, vekas eĉ la kontraŭulo — se li ne estas spirite tre evoluinta — la samajn sentojn kaj pli kaj pli fortigas ilin. Krome ili eĉ ambaŭ forigas la atenton de la faktoj, kiuj devus esti objekto por la diskutado, kaj inertigas la senton kaj la respekton por vero kaj logika rezonado.

En la ĉiutaga vivo kaj eĉ en la mondo oni renkontas tian argumentadon eĉ primitivaj, mense ne evoluintaj personoj, same eĉ malgrandaj infanoj, kiuj ankoraŭ ne klare komprenas, kion ili diras, sed volas per vortoj esprimi sian koleron aŭ malŝaton.

Fariĝas danĝere, kiam gvidantoj de grandaj homgrupoj kaj propagandaj institucioj komencas uzi tiun metodon por sia persvado. Ke ili volas pruvi la veron de certaj faktoj, oni apenaŭ povas supozi, eble ke ili volas pruvi sian kredon. La danĝero kuŝas en tio, ke troviĝas multaj homoj, ĉiukaze tro multaj, kiuj opinias, ke ju pli forta estas la insultado, des pli nerefutebla la afero estas pruvita.

Ankoraŭ pli danĝere estas, se oni anstataŭ aŭ kune kun la insultoj argumentas per vortoj, kiuj rilatas al realaj aferoj sed ne redonas ilin adekvate. Tre multe da homoj aprobas rezonadon, kiu estas al ili agrabla, sen kontroli ĉu la asertoj pri la faktoj estas veraj. En tia okazo ili ankaŭ facile imagas, ke ili mem rezonadas, kaj tiom pli forta fariĝas ilia konvinko.

Tiel sentoj de malŝato kaj malamo eĉ individuoj kaj homgrupoj — homgrupoj estas ankaŭ popoloj, klasoj, rasoj — povas kreski kaj esti kreskigataj ĝis fanatikeco kaj katastrofa eksplodo. La detruo kaj la suferoj eĉ la viktimoj de la germanoj kaj eĉ la germanoj sufiĉas kiel ekzemplo.

Sentoj de malkontento, malŝato kaj malamo kontraŭ homoj

aŭ homgrupoj ĉiam havas kaŭzon, ekster ni aŭ en ni. La efektiva kaŭzo ne ĉiam estas tiu, kiu ni mem pretendas. Sed kaŭzo troviĝas, kaj ni volas forigi ĝin. Por povi tion efektive fari, ni devas esplori la realajn faktorojn en tiu kaŭzo kaj kiel ili rilatas unu al alia kaj eble ankaŭ al aliaj faktoroj. Konsiderante kaj konkludante ni devas atenti, ke niaj imagoj, nocioj kaj vortoj respondas al efektivaj faktoj kaj ke niaj konkludoj estas logikaj. Eĉ tiel ni havas grandan ŝancon ne sukcesi, ĉar niaj konoj kaj kompreno estas limigitaj. Sed se ni malatente aŭ intence preterklasas ion en tiu procedo aŭ eĉ enŝovas ion, kio ne estas adekvata al la realo, la rezulto de nia posta agado nepre fariĝos io alia ol tio, kion ni deziris. Krome la kaŭzo ankoraŭ restos.

Kelkaj jarmiloj pasis de kiam homoj komencis observi kaj esplori objektojn kaj iliajn interrilatojn kaj el tio fari logikajn konkludojn. Konstruante sur tiu simpla fundamento la homoj konstruis la tutan sciencan kaj la tutan teknikan de nia tempo. Ĉiu iom instruita homo komprenas, ke estas necese procedi laŭ tiu fundamento kaj resti fidela al faktoj kaj logiko, se oni volas ion atingi en ekzemple maŝinkonstruado. Eĉ plej etan nombron ni ne povas ŝanĝi en formuloj, kiuj montriĝis respondi al la rilatoj en kaj inter la materiaj aĵoj. Neniu homo kredas, ke magiaj aŭ aliaj fantaziaj procedoj povus anstataŭigi la procedadon de inĝeniero.

Sed kiam temas pri faktoj kaj interrilatoj, kiuj koncernas homojn kaj homgrupojn ni ankoraŭ, kun malmultaj esceptoj, troviĝas en epoko antaŭ la unuaj geometristoj kaj logikistoj. Insultvortoj por krei liberon kaj egalcecon estas samvalidaj kun magiaj elkrioj por forigi malsanojn aŭ aliajn malbonojn. Ideologioj kaj sistemoj por atingi la saman celon egalas al la sciencopretendaj formulokolektoj de postaj magiokredantaj epokoj.

La mondo kaj la rilatoj en ĝi ŝanĝiĝas ne laŭ niaj dezirfantazioj. Se ni agas laŭ la dezirfantazioj, sen atenti la realon, la mondo eble ŝanĝiĝas, sed la rezulto fariĝas alia ol la atendita.

Tia magia aŭ ĉarlatana gvidado de homoj kaj homgrupoj kondukas al malpaco kaj detruo, sed ĝi havas ankaŭ alian malbonan influon. Se ni anstataŭ vortoj kun difinita enhavo kaj

adekvataj al la realo uzas insultvortojn aŭ aliajn vortojn, kies rilato al la realo estas nepreciza aŭ malpreciza, ni provas fuŝi la realon, ni ne plu respektas la efektivan ekziston kaj la veron — vero estas adekvateco de niaj pensoj kaj vortoj rilate al la mondo kaj ĝiaj rilatoj, eĉ kiam temas pri spiritaĵoj — ni fariĝas malhonestaj al la vivo mem kaj apartigas nin de ĝi. Ĉu ni tiuokaze povas vere partopreni la vivon kaj la okazadon, evolui kaj evoluigi? Se ni sukcesos en niaj klopodoj, ni kreos ion falsan kaj vantan, kio malutilos kaj mallonge restos.

Se ni ne respektas la vivon kaj la veron en iuj kazoj, ni same facile povas nei ilin en aliaj, kiam estas konvene kaj avantaĝe por ni. La suma rezulto de la homa sinteno al la vivo kaj ĝiaj rilatoj estas la tuta kulturo de la homaro, materia kaj spirita. Se ni ne plu respektas la vivon kaj la veron, ni povas nei kiun ajn parton de tiu kulturo, ĝi estu kiom ajn ekzakta, kaj eĉ la tutan kulturon. Estas facile imagi, kion tio povus signifi por ĉiu homo kaj la tuta homaro. Tia sinteno neniom efikus al la vivo mem. Vero restas vero kiom ajn neata. Sed la homoj povas tiel en stulteco apartigi sin mem de la realo kaj kondamni sin al pereco aŭ reiro al iama primitiva ŝtupo.

(Por ke mi ne estu miskomprenata, mioble devas aldoni, ke la supra rezonado pri vortoj kaj realo ne signifas, ke ni devas forigi lingvajn figurojn kaj formallogike neekzaktajn simbolojn. Cetere ankaŭ ili devas esti veraj, en sia maniero, laŭ sia logiko. Sed tio estas alia ĉapitro.)

Gandhi estis verulo. Eĉ dum la plej ekscita streĉiĝo inter Anglujo kaj Hindujo liaj artikoloj en Young India estis simpla montrado de faktoj, kaj li matematike trankvile faris la konkludojn aŭ lasis al la legantoj fari ilin. Tia li estis en ĉiuj siaj skribaĵoj, kaj en tio li estas brila ekzemplo al la tuta homaro. Sed tio ne signifas, ke liaj konceptoj kaj konkludoj ĉiam estis nepre ĝustaj. Ankaŭ konceptoj kaj konkludoj de sciencistoj ne ĉiam estas ĝustaj. Konoj kaj kompreno estas limigitaj. Sed la plej grava afero estas respekto al la vero. Du homoj aŭ homgrupoj kun diversaj konceptoj sed kun respekto al la vero nek insultas unu la alian nek persvadas per sofismoj, ankoraŭ malpli provas pruvigi la veron per la pugnoj. Por ili la vero

estas la unua afero. Ambaŭ estas pretaj diskuti, kaj el tia diskuto povas estiĝi eĉ pli granda rezulto ol unu sola estus povinta atingi.

"La vero vin liberigos". Tiu vorto ampleksas religion, filozofion, scienccon, sociajn demandojn, nian tutan vivon kun ĉiuj niaj rilatoj al la detaloj kaj la tuto de la ekzisto.

Proletara lingvo

De L. C. DEIJ

Fulmo de malam' kaj tondroj de kolero
suferige trafas mian koron, frato!
Sed mi sondis la profundon de l' mizero
— ankaŭ mian ventron tordis la malsato! —
kaj se via kruda lingvo min turmentas —
tra l' ekstera vest' mi la animon sentas:

La batal' pro justo — pura poezio;
sama rajt' por ĉiuj — pura religio;
pura am' — la klasa solidaro;
vin mi ne riproĉos, proletaro!

Ĉu ne vere, ke Psalmisto justovola
krude damnis la tiranon al pereco?
Kun potenca tondro la J'accuse de Zola
sonis kiel justaklama epopeo!
Juston kriis ankaŭ viaj venĝokantoj;
juston pro la turmentataj laborantoj!

La batal' pro justo — pura poezio;
sama rajt' por ĉiuj — pura religio;
pura am' — la klasa solidaro;
vin mi ne riproĉos, proletaro!

Tial min timigas la tro kruda vorto,
ĉar ĝi povas malnobligi propran penson!
Parolante pri detruo kaj perforto
vi kulturigas ĉe vi mem — tiranan menson.
Pro la Justo justa estu propra fardo;
por homigi — mem homiĝu, proletaro!

La batal' pro justo — pura poezio;
sama rajt' por ĉiuj — pura religio;
pura am' — la amo por la homo;
pura lingvo — frata idiomio!

Ĉu kondamni teknikon?

De GÜNTHER BÄMMERT

Kiam junulo mi laboris en desegnejo de elektra centro. Iun tagon bonvola, artama inĝeniero demandis: "Kiel plaĉas al vi la laboro tie ĉi?" — "Ho, ege interesas min tekniko kaj ĉiuj teknikaj demandoj. Sed la ĉiutaga klopodado pri detalajoj kaj pedante precizaj aferoj estas tre laciga. Koncerne la teknikon ĝenerale mi pripensas la malĝojigajn cirkonstancojn en la laborejoj de la industrio, la malaltan vivtenon kaj mizerregon de la laboristoj."

La inĝeniero komprenplene kapjesis: "Vidu: ni admiras la piramidojn de la antikva Egiptujo, sed kiu pensas pri la vipobatoj de la laborestroj, pri la sangantaj, nudaj dorsoj de la mizeruloj, kiuj devis treni la ŝtonblokojn por tiuj konstruaĵoj?"

Ofte mi pensis pri tiu interparolo, kaj denove memorigis pri ĝi artikolo en angla revuo, en kiu estas esprimita jena opinio: "La homo imagas, ke li povas eviti ŝvitadon kaj mizeron, ke li fariĝos libera, kiam li estos inventinta sufiĉe da maŝinoj. Sed tiel li kontraŭe ankoraŭ pli sklaviĝos, tiel ke li mem fariĝos roboto regata de la maŝinoj, kiujn li inventis. Ĉiu nova maŝino ricevis entuziasman akcepton. Sed post kelka tempo oni deziras,

ke ĝi neniam estus inventita." La aŭtoro tiurilate mencias la inventon de flugmaŝinoj kaj la militajn bombnoktojn kaj ke aviado tute ne estas nura plezuro.

Sed ĉu ni rajtas tiel kondamni la inventistojn kaj iliajn kreaĵojn? Ĉu pri ĉio tio ne kulpas la homo, kiu mizuzas aŭ fiuzas la ilojn pro erara pensado, pro malbonvolo, pro egoismo?

Scienculoj certe pravas dirante, ke invento de iloj estis la disvojo, de kie la homoj malproksimiĝis de la bestoj. Sendube la iloj, ĝiaj aplikado kaj la penado por plibonigi ilin, instigis la pensadon, kreskigis per tio la cerbon kaj kapabligis iom post iom pli bone pripensi ankaŭ aliajn aferojn, pli poste eĉ temojn, kiuj tuŝas ne la materialan vivon: sciencajn aferojn, filozofiajn demandojn, religiajn aferojn.

Sed la unuaj iloj, la deŝirita branĉo aŭ la ŝtono, per kiuj la prahomo faligis fruktojn de arboj, povis trafi ankaŭ ĉasbeston aŭ homan kontraŭulon. Estiĝis la unua armilo. Necese devigis plibonigi ĝin por defendi sin kontraŭ rabobestoj kaj homa perforto. La pratempaj iloj do preskaŭ senescepte estis samtempe armiloj aŭ almenaŭ iloj por fari kaj plibonigi armilojn.

Tiamaniere el la ilo elfluis beno kaj malbeno, lumo kaj ombro de la homa vivo. Kuŝas granda tragiko en la evoluo de la homo. Kaj fariĝis giganta tasko por ni nuntempuloj solvi tiun problemon. Fakte estas: ĉu jetbastono, ĉu atombombo — ĉiukaze homoj kulpas pri ĉiu perforto kontraŭ homoj, kulpas pri sklavigo, malinda laboro, pri malsato, pri iu maljusto, kiam li mem havas abundon kaj profitas de mizero de alia.

Ni ne povas ŝanĝi la pasinton. Ni ne povas fari ĝisnunan evoluon neokazinta. Ni ne povas rezigni pri la tekniko nek ekstermi ĝin. Ni povas nur rigardi kaj iri antaŭen al alta granda celo: ekstermi la egoismon de la homoj. Kia granda tasko — dum militoj furiozas tra multaj landoj, dum onidiroj pri tria mondmilito disvastiĝas! Ĉu vana klopodado, freneza deziro? — Estas nur pledo por racia pensmaniero.

Ĉar post kiam la homoj sukcesis atingi juston interne de la ŝtatoj almenaŭ tiom, ke la granda plimulto evitas grave difekti la rajton de iu, nun estu eble ankaŭ akcepti validajn leĝojn por glatigi interŝtatajn aferojn.

Estas ja nur egoismo, fieraco kaj netoleremo, kiuj malhelpas honajn rilatojn inter unuopuloj kaj same inter ŝtatoj. Sed ĉu tiuj kvalitoj estos venkataj? Kiu konas la homojn, tiu ne senkaŭze dubas pri tio.

Ĉu la tendenco de nia epoko ne celas havigi al kelkaj malmultaj ĉiujn riĉaĵojn kaj la tutan potenceon, tiel rabante honestaton kaj homrajtojn de ĉiuj aliaj? Kaj ĉu tia evoluo ne estas favorata de la malalta pensmaniero de la subpremitaj amasoj, de ilia envio, avaro kaj timo pri pano kaj laboro?

Do nur instruado, edukado kaj kiel eble plej perfekta unuiĝo de la subpremitoj povas konduki al solvo de nia problemo. Kaj ĉu tio ne devas okazi sub la signo de vere krista amo, ĉu alie estas eĉ ebla?

La homa korpo sub premo

De MASON STUTTARD

Teknikaj eltrovoj ĉiam sekvigas novajn problemojn. La rezisto aŭ reago de la homa korpo ofte estas grava faktoro en la demando pri praktika apliko de nova ideo.

En la kampo de subakva laboro — ĉu en paca tempo, ĉu dum milito — konstante prezentas sin novaj komplikaĵoj, kiuj postulas tujan atenton, kaj kiujn oni devas simpligi por eviti ĝenaĵojn, eĉ la morton, al la homoj kiuj devas deĵori en la vastaj spacoj de la submara mondo.

Sen teknikaj detaloj, la afero statas simple tiel, ke se homo irus profunden sen speciala ŝirmo, la ĉirkaŭanta akvopremo estus tiom forta kaj la interna aerrezisto en komparo tiom malfora, ke la pulmoj kolapsus kaj la homon trafus subita morto.

Oni diversmaniere solvas tiun problemon. Ekzistas la metala skatolo — kutime en formo de sfero — en kiu subakviĝisto povas sidi en komforto kaj telefone direkti operaciojn, kiujn per elektro plenumas homoj sur ŝipo ĉe la surfaco. Ni konas ankaŭ la submarŝipon. En ŝtala sfero Beebe subakviĝis 800 metrojn.

Oni ankoraŭ ne scias, ĉu submarŝipo povus sen kolapso malsupreniri 150 metrojn.

Alia rimedo estas la armita vesto kun flekseblaj artikoj. La malfacilaĵoj pri tio estas, ke la vesto devas esti multe pli ampleksa ol la homa korpo kaj tiom pli multe estas objekto de la premo, kiu plifortiĝas je ĉiu metro for de la surfaco. Ekzemple, je profundo de 100 metroj la premo sur la ŝultroj de la portanto de tia vesto estas proksimume $3\frac{1}{4}$ tunoj! Oni rajtas konkludi, ke la armita vesto ne estas la ideala solvo por subakva laboro.

Tria rimedo rezisti la premon estas uzi veston kaj konstrui internan premon por atingi premekvilibron. Kvankam povas ŝajni strange, la vero estas, ke se homo spiras aeron je premo egala al la ĉirkaŭanta premo, li sentas nenian efikon, kaj tio fakte neniel malutilas al li. La histo, kvazaŭ fluido, disponas pri premo kaj donas nenian signon.

La ordinara kaj norma speco de submara vesto konsistas el tre peza kanvaso kun kaŭĉuko. Ĝi atingas la bruston de la homo, kaj kiam li jam enestas, oni ŝraŭbfiksas al la vesto metalan brustplaton, al kiu oni poste fiksas la ŝtalan kaskon kun frontfenestro. Kun plumboplandaj botoj sur la piedoj, kun 20 kilogramoj da plumbo sur la brusto kaj sur la dorso, kun kaŭĉukaj rubandoj, kiuj devas — sed ne ĉiam sukcesas — haltigi la enfluan de akvo ĉe la manradikoj, la subakviĝisto estas preta por malsupreniro.

Ĉe profundo de dek metroj oni povas per manpumpilo facile provizi lin per aero je ĝusta premo, sed kiam temas pri pli grandaj profundigoj, necesas maŝinpumpilo. Ekzemple, je cent metroj oni devas kumpreni la aeron en dekonon de ĝia surtera volumeno.

La tubo estas armita per spirala metalfadeno inter lamenoj de kaŭĉukdrapo kaj estas trege fortika por rezisti premojn. La aero eniras la kaskon per necesenda klapo. Tio estas tre necesa savrimedo, ĉar en okazo de malfunkcio de la pumpilo, la aero en la vesto refluas tra la tubo sekve de la ekstera premo, kaj la homo mem estus premita en la kaskon kaj la tubon tiel, ke fine restus en la kasko nur ostoj kaj pecoj de tordita karno. Tio fakte jam okazis. Sub normalaj kondiĉoj la subakviĝisto

ricevas regulan fluon de aero, kiu balonigas lian veston, ĝis lia neta pezo estas nur kelke da kilogramoj.

Ankoraŭ alia rimedo por venki la premon kaj certigi al la subakvigisto provizon da spirebla aero estas la ŝtalaj boteloj, kiujn li kunportas. Tiuj estas ŝtalaj cilindroj, kiuj enhavas kunpremitan oksigenon aŭ aermiksaĵon kaj kiuj funkcias kvazaŭ aŭtomate. Per la normala ekspansio kaj malekspansio de la pulmoj oni funkciigas klapon, kiu aŭ fluigas aŭ haltigas la oksigenon aŭ aeron. La principo estas konata ankaŭ al fajrobrigadanoj kaj savgrupoj en karbominejoj. Kun tia aparato oni povas vivi dum difinita periodo tute sendepende de la ĉirkaŭanta atmosfero, ĉu en venena gaso, ĉu en fumo, ĉu sub akvo.

Se la homo havas provizon de pura oksigeno kaj specialan skatolon kun sodokalko en kiun li povas elspiri (ĉar tiu kemiaĵo sorbas la karbondioksidon), li povas resti sub la akvo dekoble pli longe ol se li spirus nur aeron.

La ĉefaj danĝeroj rezultas el subitaj ŝanĝiĝoj de premo. Tiajn ŝanĝojn la homo povas percepti inter alie per la oreloj. La kaŭzo estas, ke se ekzistas malekvilibro de premo ambaŭflanke de la timpano, la membrano streĉiĝas. La membrano mem situas trans osta tubo, kiu etendiĝas de la orelo ĝis la gorĝo. Parenteze, biologoj asertas, ke tiu estas la postrestaĵo de la branko, kiun havis niaj pravaĵoj, kiam ili ankoraŭ estis fiŝoj!

Aero povas facile atingi la eksteran flankon de la membrano, sed la tubo al la gorĝo estas ordinare fermita. Oni povas ĝin malfermi per gluto aŭ per forta nazblovo, se oni samtempe tenas la naztruojn tiel ke la aero ne povas eliri. Tio estas ofte utila, kiam oni havas malvarmumon.

Subitaj profundigoj — kaj inverse — tial povas kaŭzi doloron en la oreloj pro la nekutima premo. Iufoje la membrano povas rompiĝi. Ĝi poste resaniĝas, sed iufoje restas tructo en ĝi, kaj oni estas surdeta. Aviadistoj povas suferi de la sama fenomeno.

Simila ĝenaĵo estas observita ĉe la dentoj, kiujn subakvigisto ŝtopiĝis. Se la aero ne povas penetri en la kaveton, la dento povas sub granda premo kolapsi, kaj oni jam registris inversan okazon, kiam la aero post forta premo ne povis su-

fiĉe rapide eligi el la dentkavo kaj la dento krevis kvazaŭ pro eksplodeto.

La plej granda danĝero estas kurioza, tamen konata fenomeno. Ordinara homo havas en sia korpo proksimume unu litron da nitrogeno. Se li restas ses horojn en atmosfero de premo pli forta ol la normala, la nitrogeno kreskas ĝis du litroj, kaj tiel plu. Iuj organoj, ekzemple cerbo kaj hepato, rapide sorbas la nitrogenon, sed organoj kun nebona sangoprovizo — grasoj, artikoj ktp. — nur malrapide. Estas konata fenomeno, ke se oni havas fluidon, en kiu gaso estas solvita je altega premo kaj oni subite forigas la premon, la gaso malsolviĝas kaj formas grandajn vezikojn. Ni diras, ke ĝi eferveskas. Ekzemplo estas malŝtopado de botelo da ĉampanvino aŭ mineralakvo.

Iom simila fenomeno okazas en la homa sango, se oni forigas subite la premon. Iu subakvigisto pro ia ne singarda ago pafiĝis el la profundoj al la surfaco. Post nur momento lia vizaĝo estis nigra pro sufokiĝo. Oni malŝraŭbis la kaskon, kaj post kelke da minutoj li mortis. Se oni estus tuj resendinta lin en la profundojn, sen malŝraŭbi la kaskon, li verŝajne baldaŭ estus reveninta al konscio kaj normala stato. Tio nun estas la kutima procedo en tiaj eventualaĵoj. La kaŭzo de la sufokiĝo estas, ke la sango estas en eferveska stato, kaj la koro ne kapablas peli la vezikojn tra la kapilaroj, la harsimilaj vazoj, kiuj kunligas la arteriojn kun la vejnoj. Malrapida supreniĝo tamen ebligas al la sango malŝarĝi sin de superflua nitrogeno pere de la pulmoj kaj la elspiroj de la homo.

Tio prezentas nur kelkajn el problemoj, kiujn devas fronti homoj en speciala laborkampo. Aliaj laboristoj en simile strangaj medioj havas siajn problemojn. Iom post iom la tekniko solvas la problemojn, kiujn ĝi kreas.

El Nederlanda folkloro

De J. M. TOORNEMAN

LA VIDVINO DE STAVEREN

En la sudokcidenta parto de la nederlanda provinco Frislando situas malgranda urbeto, kiu nomiĝas Stavren, nuntempe nombranta maksimume nur mil loĝantojn. La haveno estas plena de sablo; tial la malgranda nombro da fiŝistoj ne povas eniri ĝin kaj devas serĉi alian ankrejon.

Sed en la mezepoko tiu loko estis granda kaj prospera urbo. Ĝi estis membro de la potenca Hansaligo, kaj oni asertas, ke tiam la peronoj antaŭ kelkaj konstruaĵoj konsistis el oro. Certe tio estas troigo, sed estas vero, ke Stavren tiutempe estis impona kaj sukcesa komercejo kun tre riĉaj ŝipekipistoj, komercantaj en la tuta tiutempe konata mondo. Iliaj ŝipoj veturis sur multaj maroj sed precipe sur la Balta maro.

Hodiaŭ la gloro de la urbo tamen estas pasinta, kaj la legendo rakontas al ni, kial ĝi spertis la veron de la proverbo: "Fiereco venas antaŭ la falo".

La plej grava el la ŝipposedantoj estis riĉega vidvino, loĝanta en granda kaj alta kastelo, el kies supra salono ŝi ĝuis vastan vidon super la ĉirkaŭantaj akvo kaj tero. En la urbo kaj la najbaraj regionoj ŝi estis konata kiel ekstreme fiera kaj senkompata virino. Ĉio kaj ĉiuj devis kliniĝi antaŭ ŝia volo, kaj ŝi ĉiam neglektis la bezonojn de malriĉuloj kaj mizeruloj. Neniam ŝi pripensis la averton de la parolo: "Kiu altigas sin, tiu humiliĝos".

Iam la vidvino venigis sian plej kapablan ŝipestron kaj en facilanima kaprico ordinis al li forveturi orienten kaj serĉi por ŝi la plej grandan valoraĵon, kiun li povos trovi dum sia marvojaĝo. Kia malfacila komizio por la sperta grizharulo! Kion li alportu por oferti al sia drololita mastrino? Ĉion valoran ŝi posedas: multekostajn ŝtofojn, juvelojn, oron kaj arĝenton. Ne sciante kien sin turni la ŝipestro forveturis, ĉiam meditante pri la altvalora varo, kiun li devas serĉi. Longtempe li trakrozis marojn, vizitis diversajn landojn, esploris multajn magazenojn

sed ne sukcesis trovi ion, kio plaĉas al li kaj eble povus kontentigi lian postuleman estrinon.

Fine li tamen venis al Danzig, kaj tie li hazarde eniris grenprovizejon. Belegan, orkoloran tritikon li vidis, kaj tuj kaptis lin la ideo: Tiu estas la plej bona greno, kiun mi iam vidis. Mi aĉetos parton de ĝi kaj plenigos la holdon de mia ŝipo per tiu valoraĵo; ĝis nun mia mastrino neniam ricevis tian multekostan ŝarĝon. Jus dirite, tuj farite.

Kiel eble plej baldaŭ li velas hejmen, kie lia mastrino jam delonge malpacience atendas lin. Scivole ŝi iras al la haveno por ekscii, kiun nekonatan ŝarĝon la ŝipo entenas. Kiam ĝi albordiĝas, ŝi ne plu povas regi sian sciavidon kaj vokas al la ŝipestro: "Tuj montru al mi la trezoron, kiun vi trovis!" Oni malfermas la lukojn de la ŝipo, kaj antaŭ la mirigitaj okuloj de la vidvino vidiĝas la plej bona nutraĵo, kiun ŝi iam rigardis.

Momenton ŝi staras konfuzita kaj ne povas eligi eĉ unu vorton, sed baldaŭ ŝi reakiras la voĉon kaj kolermiene kaj furioze kriegas: "Kian aĉan varon vi kunprenis! Kiuflanke vi ŝarĝis tiun malpuraĵon?"

"Baborde, sinjorino", estas la humila respondo.

"Se tiel, ĵetu triborde la ŝarĝon en la maron!" sonas la kruela ordono.

Poste laŭta hontokrio sonas supren el homamaso, kiu kolektiĝis laŭ la haveno. "Ho, nobelulino, donu al ni tiun nutran grenon", petegas aro da malriĉuloj. Sed la malhumila virino ignoras tiun pecon, kvankam la voĉo de respektinda grizulo admonas ŝin: "Sinjorino, ne moku la ĉielajn donacojn: iam vi plendos pri via senpripensa faro".

Tirante ringon de sia fingro kaj ĵetante ĝin en la maron ŝi ekkrias: "Same certe kiel tiu ringo ne revenos al mi, mi ne bedaŭros mian agon". Kaj ŝi devigas la ŝipestron vole nevole ŝuti la valoran grenon en la akvon.

Post kelkaj tagoj la kuiristo de la vidvino aĉetas grandan fiŝon. Purigante ĝin li trovas ringon en ĝia stomako. Mirigite li iras al sia mastrino kaj montras la ornamaĵon. Paleco de

morto kovras ŝian vizaĝon. Tiu ringo estas la sama, kiun ŝi forĵetis.

La antaŭdiro de la maljunulo veriĝis. Uraganoj, inundoj kaj incendioj detruis la kastelon kaj la ŝipojn de la tierulino, kiu kuraĝis inciti la ĉielon. Ŝi perdis ĉiujn siajn posedaĵojn kaj malriĉiĝis kiel muso preĝeja, tiel ke ŝi devis almozpeti dum siaj lastaj jaroj.

Antaŭ la havena enirejo poste altiĝis vasta sablaĵo, sur kiu kreskis aro da grentrunkoj, sed la spikoj ne portis grajnojn. Ĝis la hodiaŭa tago ĝia nomo estis *Virina sablo* kaj tiel restos eterne kiel memorigo pri la vidvino de Staveren.

DU SANKTULFESTOJ

Kvankam Nederlando ne estas katolika lando (nur proksimume du kvinonoj de la loĝantoj apartenas al la papa eklezio), ekzistas tamen du katolikaj popolfestoj, kiujn ankaŭ la ceteraj loĝantoj festas kun plej grandaj plezuro kaj amuzo. Kompreneble ili ne celebras la preĝejajn solenojn sed festas ilin en la familia rondo kaj sur la lokaj stratoj.

La nomoj de la koncernaj sanktuloj estas Sta Marteno kaj Sta Nikolao, kies kalendaraj datoj estas respektive la 11a de novembro kaj la 6a de decembro. Ambaŭ apartenas al la tiel nomataj "rajdantaj sanktuloj", tio signifas, ke oni ĝenerale figuras ilin sidantaj sur ĉevalo. La du sanktuloj estas ambaŭ konsiderataj ankaŭ kiel bonfarintoj.

Origine Marteno estis pagano, sed dekokjara li estis baptata. En sia posta vivo li fondis monaĥejojn apud Poitiers kaj estis elektata episkopo de Tours, kie li mortis ĉirkaŭ la jaro 400. Pro lia merito por la plivastigo de la kristanismo en Francujo la romkatolika eklezio kanonizis lin pli malfrue. Ĝenerale li estas honorata pro siaj humileco kaj virto, kaj tial ne estas mirige, ke multaj legendoj akompanas lian memoron. La plej konata estas la sekvanta.

Iam renkontante ĉe la pordego de la urbo Amiens almozpetanton, mizere vestitan, li tranĉis sian mantelon en du pecojn kaj kovris per unu duono la tremantajn membrojn de la kom-

patindulo. Tiamaniere li ofte estas figurita sur blazonoj de urboj, gildoj, institutoj kaj asocioj.

La festoj dediĉataj al lia memoro multe diferencas en diversaj regionoj de mia patrujo. En kelkaj lokoj oni aranĝas grandajn orgiojn, ofte sekvatajn de vomemo kaj ebrieco, nomataj la malsano de Sta Marteno. Aliloke oni manĝas grasajn anserojn honore al lia nomfesto.

Sed la plej ofta popolkutimo estas la lumfesto. En la tago la infanoj faras rondiron laŭlonge de la domoj, kantante ĉi tiun versaĵon:

Sankta Marteno, Sankta Marteno,
la bovidoj portas vostojn,
la bovinoj portas kornojn,
la preĝejoj portas turojn,
la turoj portas sonorilojn,
la virinoj portas jupejn.

Post la kantado la junularo petas lignon, pajlon, fojnon, torfbrikojn, ĉiuzitajn korbojn, barelojn ktp.; ĉiuj tiuj materialoj estas por fajrego, kiun oni ekbruligos en la sama vespero.

Kiam krepuskiĝas, granda procesio de infanoj marŝas en direkto al la brulejo, ĉiuj portante iun aŭ alian lumigilon, kavigitajn napon, rapon aŭ beton, kiuj estas ornamitaj per eltranĉitaj figuroj kaj provizitaj per brulanta kandelo. La gejunuloj faras rondodancojn ĉirkaŭ la alte flamanta lignofajro, kantante malnovajn arietojn. En la mezo de la ŝtiparo estas starigita fosto kun gudrujo sur sia supro, kaj laŭtaj krioj aŭdiĝas, kiam la facile ekflamiĝanta fluidaĵo ekbrulas. Amaso da fajreroj leviĝas en la acron kaj fine estingiĝas. Iom post iom la flamoj malaltiĝas. Kiam restas nur rubamaso, el kiu la ruĝa ardo heligas la ĉirkaŭstarantojn, rondo de infanoj, poste pligrandigita de plenkreskuloj, faras saltojn trans la bruletantan ruinaĵon. — La fajro simbolas varmon kaj ardon, novajn vivon kaj forton, serenon kaj purigon. Ligita al tiaj pensoj, la priskribita popolkutimo, origine el pagana epoko, posedas sencoriĉan signifon.

Al la plej tipaj el niaj ĝeneralaj festoj apartenas la tago de Sta Nikolao, populare nomata Sta Klaŭso. Lia nomfesto estas en la 6a de decembro, sed jam la antaŭajn tagojn oni festas

ĝin. Li okupis la oficon de episkopo de Myra en Malgrandazio, kie li mortis en la jaro 327. Komercistoj el Napoli rabis lian ostaron kaj portis ĝin al la itala urbo Bari, kie li estis entombigata. La respektinda viro posedas trioblan patronceon, nome pri navigantoj, infanoj kaj fraŭlinoj. Tion li dankas al tri bonfaraj agoj, rerakontitaj per jenaj legendoj.

Iam li antaŭdiris uraganon kaj poste per preĝado trankviligis la furiozan maron. Pro tiu ago li fariĝis la patrono de la marveturistoj kaj multaj havenurboj, kie estis fondataj preĝejoj kaj kapeloj honore al lia memoro.

Ke la episkopo estas honorata kiel infanamiko eble apogiĝas je legendo, kiu diras, ke li iam savis de certa morto tri infanojn, kiuj serĉis mitulojn por kvietigi sian malsaton kaj riskis vadi tro malproksimen en la maron. Kaŭze de tio la infanoj estas rekompencataj en la nokto antaŭ la 6a de decembro. La gepatroj mistifikas al ili, ke Sta Klaŭso tiam rajdas sur blanka ĉevalo super la tegmentoj kaj tra la kamentuboj ĵetas ludilojn kaj frandaĵojn por la bonuloj kaj vergojn por la maliculoj. Tial la infanoj metas antaŭvespere sub la kamenon ŝuon kun fojno kaj karoto por la ĉevalo kaj trovas en la posta mateno donacon aŭ punilon.

Tiel Sta Nikolao anstataŭigis ĉe niaj paganaj prapatroj la kredon al Votan, kiu ankŭ rajdis sur blanka ĉevalo tra la aero en tempestaj noktoj.

La malavareco de la episkopo montriĝas el tria legendo. Iu malriĉa nobelo havis tri filinojn en aĝo de edziniĝo, sed li ne posedis sufiĉan monon por doni dotojn al ili. Tial minacis la danĝero, ke ili malhonorigis per malĉasta konduto. Kiam Nikolao aŭdis pri tio, li ĵetis nombron da ormoneroj tra la malfermita fenestro de la dormĉambro de la fraŭlinoj, kaj la moneroj falis ĝuste en iliajn ŝuojn. Nun vi komprenas, kial geamantoj reciproke donas kaj ricevas donacojn en la vespero antaŭ la tago de Sta Klaŭso.

Lingvaj sugestoj

La artikolo.

Sro A. de Freitas, Belo Horizonte, legis miajn lingvajn sugestojn en nro 2/48. Li trovas, ke estas malfacile korekte uzi la artikolon kaj petas min klarigi la aferon.

Mia tempo ne sufiĉas por privata korespondo pri lingvaj aferoj. Sub Lingvaj Sugestoj mi volonte traktas donitajn demandojn, se ili ne apartenas al la elementa gramatiko. La demandoj de sro de Freitas estas proksimaj al la elementa gramatiko sed parte apartenas al pli vasta lingva kampo. Tial almenaŭ kelkajn vortojn responde.

Sro de Freitas donas diversajn citaĵojn de Zamenhof kaj Fruictier, montras ke ekzistantaj reguloj ne estas perfektaj, ke ĉe Zamenhof foje estas necerta, ĉu en tiu aŭ tiu kazo estas korekte uzi artikolon aŭ ne. Krom ĉi li provas mem starigi iujn regulojn.

Mia respondo: Neniu reguloj sufiĉas por ĉiuj eblaj kazoj en la lingvouzo. Bonan, vivan lingvon oni neniam povas atingi per reguloj. Kiu tute aŭ grandparte bazas sian esprimadon sur reguloj metas barilojn kontraŭ sia propra lingva evoluo. Por efektiva lingva perfektigo reguloj estas nur modestaj helpiloj. En ĉio esenca la perfektigo dependas de aktiva atento al la lingvouzo de si mem kaj aliaj, ĉiama ekzercado de racio kaj logiko en sia esprimado. Tia ekzercado estas ĉbla nur per senĉesa praktika uzo de la lingvo, antaŭ ĉio skriba.

Se ni perfektigas nin laŭ tiu metodo, ni iom post iom pli kaj pli klare *komprenas*, kio estas korekta aŭ ne, kvazaŭ vidas konkrete antaŭ ni la funkcion de ĉiu parto en la lingvo. La multiplika tabelo, reguloj kaj formuloj ne povas krei matematikiston. Tion faras nur matematika pensado. Efektivan perfektigon en sia gepatra lingvo kaj en esperanto oni akiras nur per lingva pensado. En aliaj lingvoj oni preskaŭ tute ne povas atingi ĝin. Tie oni devas uzi regulojn kaj lerni parkere, sekve — kaj tio estas brila rezulto — atingas nur korektecon.

La artikolo havas sian funkcion, ĝi difinas, indikas, ke temas

pri iu certa afero, ĉu aparta ĉu ĉionampleksa. Ekzercu vian logikon kaj racion por uzi ĝin laŭ tio!

Leono estas flava, la leono estas flava, leonoj estas flavaj, la leonoj estas flavaj. — Mi kredas, ke ĉiu, kiu trapasis clementan kurson, povas kontentige analizi kaj kapti la sencnon kaj la funkcion de la artikolo en tiuj frazoj. Se vi tion povas, vi jam havas la esencan fundamenton por ĝia uzado. Nur uzu vian propran pensokapablon, kiam vi ne tuj perceptas, kio estas logika.

Ke oni en esperanto imitas diversajn naciajn lingvojn uzante la esprimojn "la leono, la homo" ktp anstataŭ "la leonoj, la homoj" (en la senco de ĉiuj) estas aparta afero, eble parte nebona. Sed tiu esprimmaniero havas ne malgravan poezian kaj retorikan valoron, kaj mi ne kuraĝas kondamni ĝin.

Sro de Freitas demande citas du frazojn de mi. "Engholm en MR nro 2, 1948, p. 24, skribis: 'La esperantistoj apartenas al diversaj nacioj...,' sed sur la paĝo 25 li riproĉas: anstataŭ 'La libroj estas grava parto de la kulturo', oni diru 'libroj estas...'"

Unue: mi tute ne riproĉas, eĉ ne konsilas. Atentu, ke la titolo estas Lingvaj Sugestoj. Al neniu mi altrudas ilin, kaj mi ne deziras, ke oni uzu miajn sugestojn kiel regulojn. Mia sola celado per la sugestoj kaj atentigoj estas vekii intereson por lingva pensado.

Due: Per sia citaĵo li ŝajne volas demandi, kial la artikolo ne estas necesa antaŭ 'Libroj', se ĝi estas necesa antaŭ 'esperantistoj'. Respondo: En la unua frazo mi parolas ne pri iuj esperantistoj sed pri difinita aro, nome ĉiuj esperantistoj. En la dua mi ne difinas, kiuj libroj estas necesaj, nur faras ĝeneralan konstataĵon pri libroj kaj kulturo. Ne ĉiuj libroj estas necesaj, kaj la necesaj ne estas tie ĉi difinitaj.

Multe — multo.

Iuj kelkfoje atentigis al mi, ke mi en diversaj lokoj skribis "multe", kie devus esti "multo", ekz. post havi, fari, vidi. Pri tio mi antaŭe ne pensis. Konsiderinte la aferon dum du jaroj,

mi ankoraŭ ne emas cedi al "multo", sed mi neniel pretendas, ke mi estas prava.

La frazo "Mi multe vidis dum mia vojaĝo" pli plaĉas al mi ol "Mi multon vidis dum mia vojaĝo". "Multo" vekas ĉe mi imagon de grandega bulo, kaj la vorto ne plaĉas al mi. Sed tio estas subjektiva. Ĝi ŝajnas al mi samsignifa kun "multeco", abstrakta, kvantoresuma vorto. "Multe" havas por mi pli konkretan nuancon, kvankam la aluditaj aferoj estas nedifinitaj.

Sed multe estas adverbo! Nu, ankaŭ en naciaj lingvoj ĝi estas adverbo, tamen ni uzas ĝin en senco, kiu ŝajnas al mi esti tiu de nedifinita pronomo. Tio ne estas motivo por fari la saman en esperanto, sed oni tamen povas fari komparon. Ŝajnas al mi, ke tiu uzo en senco de nedifinita pronomo donas sencnon, almenaŭ nuancon, kiun ni ne atingas per "multo" — grandkvanto, amaso.

Kiel vi formus la frazon "Mi vidis pli multe ol vi dum nia vojaĝo"? Ĉu "Mi vidis pli multon..."? Mi efektive vidis tiun esprimon, sed de kiam oni povas komparacii substantivojn? Ĉu tio ne iom sugestas, ke "multe" en senco de nedifinita pronomo havas certan sencnon?

Mi ne ŝatas uzi citaĵojn. Citaĵoj nenion pruvas. Tion povas fari sole racio kaj logiko. Tamen kelkaj citaĵoj montru, ke "multo" jam pli frue estis uzata en mia maniero.

En Predikanto, 5:12 "... manĝis malmulte aŭ multe." Ne povas temi pri la intenso aŭ daŭro de la agado, sed temas pri la manĝaĵo.

"Kiom multe vi donus por tio?" Z. Se oni povas tiel demandi, oni nepre povas respondi per "tre multe" aŭ nur "multe".

"Kiu multe parolas, ne multe faras." Z. "Du homoj povas pli multe fari ol unu." Z. — En ambaŭ tiuj frazoj "multe" evidente ne rilatas al la intenso aŭ daŭro de la farado sed al la aferoj farataj.

Se la vorto "multe" en senco de nedifinita pronomo ne estas formale logika, ĝi tamen eble estas racie defendebla.

Ĉu adverbo ĉu adjektivo?

Tiu ĉi punkto apartenas tute al la elementa gramatiko. Ĉar erara uzado ne estas malofta kaj foje eĉ rekomendata, mi tamen volas dediĉi kelkajn vortojn al ĝi.

Mi minimume dufoje vidis recenzan aserton, ke la tradukinto "ŝajne volas tute ekstermi la adverbojn el esperanto". La kritikata esprimo estis de la tipo "La viro sidas trankvila". La recenzisto opiniis, ke la adjektivo estas erara aŭ almenaŭ nebona. Devus esti adverbo. Sed la konstruo estas tute bona. "Trankvila" estas kvalitaldono al la subjekto, kvankam ĝi staras post la predikato. Oni nomas ĝin predikativo. Ankaŭ la objekto povas havi predikalivon, sed tio okazas malpli ofte.

En la donita frazo ni diris, ke la viro sidis kaj estis trankvila. Se mi diras "Li sidis trankvile", la senco estas, ke li sidis en trankvila maniero. Tio estas cirkonstancaldono al la predikato. (Adjekto).

Ambaŭ konstruoj estas tute korektaj, sed la sencoj estas diversaj. Se la tradukota originalo diras aŭ mia penso estas (se mi mem verkas), ke li sidas kaj estas trankvila, mi uzu la unuan konstruon. Recenzisto ne postulu, ke oni ŝanĝu la sencon de originala verkaĵo aŭ de sia propra pensado.

Kontraŭsenca uzo de cirkonstancaldonoj al la predikato anstataŭ kvalitaldonoj al la subjekto estas ne maloftaj en gazetoj kaj libroj. Antaŭ nelonge mi notis, mi nun forgesis kie, la esprimon "La arto staras nude kaj senhelpe." Laŭvorte tio signifas, ke la arto staras en nuda maniero. Kion signifas "stari en nuda maniero"? Efektive la senco estas, ke "la arto staras nuda kaj senhelpa".

Esprimante tiajn aferojn ni plej ofte pensas pri la subjekto kaj ĝia kvalito, ne pri la maniero, en kiu la agado okazas. Ni formu la frazojn laŭ la senco.

Transskribo de propraj nomoj.

Ĉu havas sencon en esperanto skribi Volter, Bodler, Cose anstataŭ la originaj Voltaire, Baudelaire, Chauscr? Mi pensas ke ne. Kial?

En lingvoj kun latinaj literoj oni ordinare skribas fremdajn

proprajn nomojn en ilia origina formo. Tio nepre estas la plej praktika maniero. Tiel oni en la tuta mondo havas unu komunan formon, kiu krome estas la nerefuteble korekta. Se oni en ĉiuj lingvoj provus redoni fremdajn nomojn laŭ propra maniero, estiĝus multe da formoj, kiuj estus multe pli ĝenaj ol utilaj. En okaza esperanta mencio pri Volter, ni diru en iu anekdoto, neinstruita leganto eble tute ne komprenas, pri kiu temas, kvankam li konas la nomon Voltaire.

Ke oni en lingvoj kun aliaj alfabetoj transskribas fremdajn proprajn nomojn estas ne evitebla, oni vole nevole devas. Ke tio ne estas avantaĝo, oni konstatas, se oni legas en la rusa lingvo. Tion konstatas certe ankaŭ ruso, se li renkontas fremdajn nomojn en latinlitera skribo.

Esperantistoj verŝajne transskribas kun la motivo, ke ni skribu kiel ni parolas. Sed tre ofte tiu elparolredono estas nura karikaturo. Volter en si mem donas tute eraran imagon pri la elparolo. Por kontentige redoni la elparolon de diversaj nomoj, ni devas havi pli da literoj aŭ uzi fonctikan skribon, krome meti akcentosignojn.

Kiam temas pri nomoj el lingvoj kun aliaj alfabetoj, ni kompreneble devas transskribi, kaj en tiu kazo ni ne imitu la naciajn lingvojn kun iliaj diversaj manieroj sed redonu per niaj literoj kiel eble plej fidele la originan formon. Tie ja ne ekzistas internacie rekonata skribmaniero.

Por landnomoj esperanto devas havi sian propran formon, ĉar internacie komunaj formoj ordinare ne ekzistas. La ĉie konataj kaj uzataj geografiaj nomoj ricevis esperantan formon aŭ almenaŭ esperantan finaĵon. Ĉar ankaŭ tiuj vortoj en naciaj lingvoj foje havas diversajn formojn, la aparta esperanta formo havas iom da motivo kaj cetere ŝajnas konvena. Sed ŝajnas al mi prudente neniam doni al aliaj geografiaj nomoj apartan esperantan formon (se ne troviĝas specialaj kaŭzoj, ekz. en bel-literaturo).

Po.

En Literatura Mondo nro 1—2 1949 aperis denove longa artikolo pri po. Mi ne tedos vin per nova pritrakto, cetere man-

kas loko, sed mi donos al vi malgrandan sugeston por pripenco kaj eventuala diskuto kun samideanoj.

Multaj montras al vorto de Zamenhof: post po ĉiam sekvas nominativo. Po estas en ekz. la rusa lingvo prepozicio kun diversaj uzoj kaj sekvata de diversaj kazoj. Kiam ĝi estas distribue uzata, sekvas akuzativo post kelkaj kalkulvortoj, cetere dativo, ĉio laŭ la logiko por tiu speciala kazo de la rusa lingvo. Kiam Zamenhof skribis, ke post po sekvu nominativo, la motivo certe estis, ke en esperanto post prepozicio sekvas nominativo (se direktomontra n ne estas necesa).

Jen mi skribas laŭ mia koncepto: La infanoj havis po unu moncron.

Kaj nun ni uzu nian ĝeneralan logikon de la esperanta lingvo, ne de iu speciala kazo en alia lingvo. Mi demandas: Ĉu la vorto moncro en la supra frazo estas agobjekto aŭ ne? Ĉu agobjekto ĉe en unu sola kazo povas resti agobjekto, se ni metas prepozicion antaŭ ĝin? Ĉu ĝi tiukaze ne fariĝas cirkonstancia esprimo? (Se ĝi povas fariĝi tia.)

Kvar solvoj estas eblaj: 1. kontraŭlogike uzi nominativon por agobjekto, 2. deklari, kiel Kalocsay, ke po apartenas ne al la agobjekto sed al la numeralo, 3. rebapti la vorton po kaj nomi ĝin adverbo (uzante ĝin ni ja ĉiukaze pensas adverbe), 4. lasi la vorton po antikviĝi kaj anstataŭe uzi ekz. "ĉiu", kio ja estas ebla.

Jam tro multe. Tamen atentu pri la sugesto pri agobjekto post prepozicio.

S. Engholm.

Literaturo

Shakespeare: La gajaj edzinoj Windsor.

Trad. Stephen A. Andrew.

Prezo: 3 ŝ. 6 p.

Eldonis: The Esperanto Publishing Co. Ltd.

Ĝenerale estas flua kaj agrabla lingvo en tiu traduko. Mi kun plezuro legis ĝin kaj volonte rekomendas ĝin al ĉiuj esperantistoj, kiuj kapablas legi teatraĵojn. — La tradukinto uzas artikolon antaŭ titoloj, ekz. "la sinjorino N. N.", "la sinjoro N. N." ktp, uzo ne ordinara kaj ne motivita. Kelkloke troviĝas "pro", kie devus esti "por". Tiuj kaj kelkaj aliaj nebonaj detaletoj tamen malmulte malkulas la impreson de la tuto.

Per tiu rekomendo povas finiĝi recenzista devo rilate al esperantistoj, kiuj serĉas taŭgan legaĵon. Sed kiam temas pri tia verko, la recenzisto havas devon ankaŭ al la aŭtoro. Laŭpove mi komparis kelkajn paĝojn kun la originalo. Kvankam mi ne estas fakulo pri la temo, kaj kvankam la sekvantaj rimarkigoj estas nur eta, hazarda specimeno, la atentigoj eble povas havi iom da valoro kiel sugestoj.

Sur p. 11 diras Slender, ke Shallow "rajtas porti dekduon da blankaj salmoj sur sia mantelo". — Ĉiuj miaj vortaroj inkl. The Concise Oxford D. asertas, kaj same la noto pri la vortludo kaj pri la blazono de la familio Lucy en mia aŭda traduko, ke temas pri ezokoj. — Anst. "mantelo" en la sama frazo "blazono" verŝajne estus pli bona. Almenaŭ al neanglo la esprimo ŝajnas stranga, kaj ankoraŭ pli stranga ĝi estas en la posta repliko de Shallow: "Ĝi ja estas tre antikva mantelo". Mi supozas, ke la antikveco rilatas ne al iu mantelo sed al la blazono. Kredeble la tradukinto intencis uzis la vorton mantelo por adaptiĝi al la miskompreno de Evans, sed ŝajnas al mi, ke per tio li atingas neniom krom iom da malklareco.

Sampage: Shallow: "Ne, ne; la Stelĉambranaro nepre aŭdu pri la afero; ĝi ja estis vera tumulto." — Angle: "The Council shall hear it; it is a riot." — Multaj esperantistoj ŝatas multajn vortojn kaj ripetadon de vortoj. La supra frazo eble estas konforma al tiu ŝato. Al la vortoj de Shakespeare kaj al ĝeneralaj esprimkonceptoj eble pli konformus: "La juĝejo (Stelĉambro) aŭdos pri tio; tio estas tumulto."

P. 12: Slender: "Ĉu fraŭlino Anne Page? Ha, jes! Ŝi havas brunajn harojn kaj parolas tiel malbase kiel iu ajn fraŭlino!" — Angle: "Mistress Anne Page! She has brown hair, and speaks small like a woman." — "Fraŭlino Anne Page! Ŝi havas brunajn harojn kaj parolas pepe kiel..." (Ĉu oni traduku "woman" per "virino" aŭ per vorto samsignifa kun "noblulino", tion mi ne scias.)

P. 18: Slender: "Mi tre amas la sporton ĉe ursoj..." — Angle:

"I love the sport well"; — "Mi tre ŝatas ĉasadon"; (La vorto ĉasado rilatas al ursoj.)

P. 25: Caius: "... Nur mi mem ekposedos la fraŭlinon Anna Page!" — Angle: "... I will myself have Anna Page." — "Mi volas mem havi Anna Page."

P. 28: S-ino Ford? "Jes, sendube via letero estas tutsimila";
Angle: "Why, this is the very same"; — "Nu, tiu ĉi estas tute sama."

P. 29: Ford: "Bone, bone; sed mi esperas, ke ne estas efektive tiel." — Angle: "Well, I hope it be not so." — "Bone, mi esperas, ke ne estas tiel."

La tradukinto ŝajne evitis kaj lasis netradukitaj lujn frazojn, kiuj estas burleskaj aŭ vulgaresprimaj. Oni povas demandi, ĉu oni devas aŭ rajtas tiel fari en traduko de Shakespeare, traduko, kiu volas esti fidinda.

La tradukinto ne provis imiti la kriplan anglan lingvon de la kimro kaj la franco. Mi supozas, ke tia imitado tamen estus dezirinda, se temas pri prezentado. Ĉar temas ne pri dialekto sed kripligo, estas sufiĉe facile imiti: "It is petter that" — "Estas pli pone ke", "in my prain" — "en mia cerpo", ktp.

S. E.

Konstitucio de Ĉeĥoslovaka Respubliko.

Tradukis Jaroslav Marik. — Kunlaboris Dro T.

Pumpr kaj R. Hromada. — Kontrolis A. Malik, prez.
de la Instituto.

Eldonis: Instituto de Esperanto-Servo en Praha.

Tio estas la nova ĉeĥoslovaka konstitucio, de la 9 de junio 1948. La lingvo de la traduko estas bona. La libreto estas 70paĝa, sur bona papero kaj kun bona preso.

Piednoto sur p. 3 diras; "nacio" estas nocio etnika, "popolo" estas nocio politika. — La klarigo respondas al vortuzo sur la sama paĝo kaj estas tiurilate korekta. Sed cetera ŝajnas al mi, ke la klasigo de tiuj du vortoj devus esti mala.

La sama eldonejo aperigas la bone verkitan kaj bone presitan bultenon "Esperanto-Servo" aktuala informo bulteno de Praha.

Kaj la Konstitucio kaj la bulteno riceveblaj de: "Esperanto-Servo", Malá štěpánská 7, Praha II, Ĉeĥoslovakio.

ATENTU!

Post la 15a de junio 1949 mia adreso kaj tiu de Malgranda Revuo estos: HAGGE, Svedujo.

S. Engholm.